Ekde 2005

pli da gazeto
pli ol gazeto!

Juna amiko

Nia revuo proponos pli da paĝoj, por liveri pli bonan servon al ĉiuj el niaj leganto-grupoj:

- Infanoj, interalie el esperantaj familioj
- Lernejanoj, kursanoj kaj iliaj instruistoj
- Junuloj en grupoj kaj solaj
- Komencantoj de ajna aĝo

La presita revuo enhavos signife pli da paĝoj, kun pli da bildoj, pli bone spacitaj tekstoj, kaj kun allogaj novaj rubrikoj. Du redaktoroj laboros pretigi ĉion. Jen ekzemploj de novaĵoj:

- **Interkulturo:** La klasoj kaj partoprenantoj de la interkultura lernado regule prezentos sin kaj siajn kontaktojn en la revuo.
- **La kvino-kvizo:** Kvizo-folioj pretaj por kopiado al grupoj. Legaĵo kun kvin divers-specaj kviz-ekzercoj. Por iuj – agrabla ludo, por aliaj – valora preparado por Esperanto-ekzamenoj.
- **Gasto-rubrikoj:** Iuj prizorgataj de junuloj, kaj el plej diversaj mondpartoj. Ni jam havas prizorganton por nova rubriko *Popol-kutimoj – nuntempaj kaj malnovaj.*

Junuloj pli kaj pli aliras legaĵojn, amuzaĵon kaj informojn el interreto. Pro tio *Juna amiko* kunlaboras kun la hejmpaĝaro de la projekto *Lernu!,* kie aperas tuta sekcio por niaj legantoj:

- Mult-lingva ret-prezentado de nia revuo
- Artikoloj, iuj aperintaj, aliaj ne aperontaj en la revuo.
- Ekzercoj, ludoj aŭ materialoj aldone al revuaj eroj.
- Ret-vortaroj, por helpi legantojn kompreni la tekstojn.
- Aliro al reta babilejo de *Lernu!* por mesaĝi al aliaj legantoj.
- Ret-rubrikoj *Deziras korespondi* kaj *Leteroj al la Redakcio…*
- Freŝaj informoj, aktualaĵoj.

En la presita revuo aperos ret-adreso per kiu abonantoj povos aliri siajn novajn paĝojn. Ni ĉiumonate aldonos freŝan materialon al la paĝaro. Do, kvankam la presita revuo reiros al apero tri-fojojn jare (kiel de 1973-1986), per la retejo *Juna amiko* aperos 12-fojojn jare! Ofteco rete, palpeblo revue.

Por aboni, kontaktu vian landan peranton:

Rigardu: www.ikso.net/ilei sub *Juna amiko* aŭ www.lernu.net sub *Juna amiko* en la biblioteko. Nerete: Juna amiko, pf. 193, HU-1368 Budapest.

Kotizoj por 2005
ekde 1 januaro 2005

	1 ekz.	**Ekde 3**
Tarifo 1	€ 14	po € 11
Tarifo 2	€ 9	po € 7

Ĝis la jarfino, validas por 2005 la nunaj tarifoj (€12 kaj €7); indas re-aboni frue!

Juna amiko – revuo kaj retejo
pli da gazeto, pli ol gazeto